

Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado



Malmultaj individuoj, instancoj, kaj registaroj principe neas la rajton de ĉiuj civitanoj, kaj specife lernejoj kaj scienculoj, sendiskriminacie aliri kaj prijuĝi informojn necesajn por la homa vivtenado kaj progreso. Ankaŭ principe neakceptebla estas diskriminacio kiu donus al specifaj nacioj, grupoj kaj individuoj la eblecon facile raporti pri siaj ideoj, esploroj, kaj eltrovoj, dum aliaj pene komunikus similkvalitajn rezultojn ne havante la okazon libere interŝanĝi spertojn kaj konkludojn kun samfakaj kolegoj.

En nia hodiaŭa mondo, tamen, tro malmultaj personoj konscias ke neniel koincidas principo kun praktiko kaj realo. Ni do rajtas atentigi pri la signifo de lingvopolitikaj decidoj de ŝtataj kaj klerigaj instancoj, ĉu konsciaj kaj intencaj aŭ ĉu ŝajne sensciaj kaj senpensaj. Kiom da scienculoj kaj lernejoj diversnivelaj en la mondaj eduksistemoj estas devigataj lerni kaj esprimi sin per nedenskata lingvo? Kiom avantaĝa estas la situacio de persono kiu ĉiam povas esprimi sin por ĉiuj komunikaj funkcioj en la propra gepatra lingvo? Kian rolon povos havi Esperanto por subteni la egaligon de komunikado en la mondaj lernejoj kaj esploroj?

Dum la ĉi-jara Konferenco kaj Simpozio de ILEI ni pritraktos tiun larĝan temon kaj ankaŭ subtemojn kiel “Lingvo de scienca komunikado”, “Edukado kaj ekzamenado en gepatra kaj fremda lingvoj”, “Edukado kaj scienca komunikado per Esperanto”, “Esperanto en modernaj amaskomunikiloj”. Lerne, pensu kaj partoprenu aktive por pliampleksigi viajn sciojn kaj pliefikigi vian laboron por sendiskriminacia politiko rilate lingvoinstruadon kaj lingvouzadon en la mondoj de edukado kaj scienco.

Duncan Charters
Vicprezidanto, ILEI

(D-ro Charters, fakultatestro pri lingvoj kaj katedra profesoro pri humanismaj studoj en Principia College, Usono, profesie prezentas pri lingvoteknologio kaj instruado de kulturo, kaj taksas por NCATE universitatajn programojn por trejnado de lingvoinstruistoj. Li estas antaŭa prezidanto de ILEI kaj de la Internacia Ekzamena Komisiono.)